


KONTAKTO

Ĉu Mikelanĝelo
estis la unua
surrealisto?

numero 228 (2008:6)
ISSN 0023-3692



ENHAVO

Intervjuo kun la nova grafikisto de Kontakto

(P. Moĵajev intervjuus Lucas Vignoli Reis)	3
La ŝoka mistero de la Siksta kapelo	
(K. A. Efetov, Ukrainio)	4
Pafoklikado kaj brua fekado (Recenzo)	
(Paŭlo Moĵajev, Ukrainio)	13
Ŝercoj	
(Olubunmi Osho-Davies, Nigerio)	14

Kiel sendi kontribuojn al Kontakto?

- ✓ Sendu prefere tekston originale verkitan en Esperanto aŭ foton/bildon memfaritan.
- ✓ Se vi sendas tradukon, bv. indiki la originajn fontojn, lingvon kaj aŭtoron. Ĉe fabelo indiku, ĉu ĝi estas popola (kaj de kiu popolo) aŭ verkita de vi.
- ✓ Kontakto ne estas movada revuo, do ne sendu al ĝi primovadajn raportojn!
- ✓ Indiku, ĉu via artikolo jam aperis, aŭ estas proponata al alia revuo.
- ✓ Fotoj devas esti bonkvalitaj, ne gravas ĉu nigrablankaj, ĉu koloraj. Ne forgesu aldoni la nomon de la artisto aŭ de la fotinto!
- ✓ Dikajn kovertojn prefere sendu registritaj.
- ✓ Rete bonvolu sendi vian artikolon kiel kutiman retmesaĝon aŭ RTF (bv uzi x-kodon por supersignaj literoj); bildojn – kiel JPEG (150-300 dpi)
- ✓ Ilustraĵoj kaj adresoj en la interreto, kiuj rilatas al via temo, estas tre bonvenaj!

Koran antaŭdankon!

Saluton, karaj legantoj kaj amikoj de nia revuo!

Denove mi devas peti pardonon pro la malfruo, kiu krom de la kutima manko de kontribuoj estis kaŭzita ankaŭ de kelkaj komputilaj problemoj. La sekva numero atingos vin jam tre baldaŭ, tamen, per viaj kontribuoj vi povas eĉ pli rapidigi ĝian aperon!

Tiu ĉi numero estas iom nekutima, ĉar ĝian pli grandan parton okupas la artikolo, tradukita el la rusa lingvo. Mi tamen opinias, ke ĝi estos al vi treege interesa, ĉar ĝi temas kaj pri la arto, kaj pri la scienco – do, simple ĝuu kaj ne forgesu esprimi vian opinion, se vi ekdeziros ion diri. Krome, atendas vin intervjuo, recenzo kaj facillingva teksto.

Agrablan legadon!



Paŭlo (la redaktoro)

Temoj de la venontaj numeroj de Kontakto

Numero 230 (2009:2). *La ĉef-temo: “Malgrandaj etnoj”. Ĉu en via lando ekzistas iuj malgrandaj etnoj? Aŭ eble vi prezentas iun nacian minoritaton en via lando? Rakontu pri ĝiaj vivo kaj problemoj! **Rapidu pri la kontribuoj!***

Numero 231 (2009:3). *La ĉef-temo: “Televido”. Kion kaj kial ni spektas televide? Ĉu en via lando ekzistas iuj specifaj televidaj programoj aŭ televidaj moderigantoj? Rakontu pri viaj televidaj kutimoj kaj preferoj! **La limdato – la 15a de julio.***

Kiel ĉiam, ajnatemaj kontribuoj estas bonvenaj kaj ege bezonataj!

KONTAKTO: Dumonata socikultura revuo de **Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO)**, eldonata de **Universala Esperanto-Asocio (UEA)**. Fondita en 1963. **N-ro 228** (2008:6), 44-a jarkolekto. **ISSN** 0023-3692. **Legata** en ĉ ĝo landoj. **TTT-paĝo:** <<http://www.tejo.org/node/7>>. **Eldonanto** (administrado, abonoj, anoncoj): **UEA:** ✉ Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando; tel.: +31 10 436 10 44, fakso: +31 10 436 17 51; ret-adreso: <uea@inter.nl.net>. **Redakcio:** Kontakto, ul. Rabochaja 24, kv. 29, Jalto, Krimeo, UA-98612, Ukrainio; ret-adreso: <kontakto@tejo.org>. **Redaktoro:** Paŭlo Moĵajev (Ukrainio) **Tipografiisto:** Lucas Vignoli Reis (kun helpo de skipo de Preface Design, <<http://www.preface.com.br>>). **Korektisto:** Aleksandro Galkin (Rusio/Germanio). **Presado:** Skonpres, Bydgoszcz (Pollando), ret-adreso: <skonpres@poczta.onet.pl>. **Konstantaj kunlaborantoj:** Joel Amis (Usono), Tatjana Auderskaja (Ukrainio), Daniel Richard Bebelacqua Acosta (Urugvajo), Daniele Binaghi (Italio), Olivier Gaudefrey (Francio), Etsuo Miyoshi (Japanio), Olubunmi Osho-Davies (Niĝerio), Maksim Petrov (Kazaĥio), Saliko (Finnlando), Aneta Ubik (Germanio), Jefim Zajdman (Ukrainio). **Facilingvaj Artikoloj** estas verkitaj en la niveloj *tre facila* kaj *facila*, laŭ la vortolisto de Kontakto. Tiu listo aperas en la unua numero ĉiujare. **Anonctarifo:** tutpaĝa 350 EUR, 1/2-paĝa 190 EUR, 1/4-paĝa 100 EUR, 1/8-paĝa 55 EUR, 1/16-paĝa 30 EUR. Anoncoj sur kovrilpaĝoj kostas duoble. Por E-organizaĵoj 50% da rabato. Varbantoj de ekstermovadaj anoncoj ricevas maklerajon de 30%. Por anoncoj bv. kontakti UEA. **Anoncoj:** por *Anonctabulo* kostas tri internaciajn respondkuponojn kontraŭ dek vortoj. Bv. sendi rekte al la redakcio aŭ al UEA. **Abontarifo:** varias laŭlande. Petu informojn de UEA. **Malfortvidantoj:** povas ricevi voĉlegitan eldonon senpage. Sendu 60-minutajn kasedojn al Elise Lauwen, Fort Alexanderstraat 16, NL-5241 XG Rosmalen, Nederlando. **Kontakto en radioj:** Regiono / tempo (UTC) / metroj / frekvencoj (kHz): Radio Havano (Kubo) Okcidenta kaj Norda Ameriko kaj Pacifika Azio / 7:00/31/9 820; Tuta Ameriko kaj Karibio / 15:00, 23:30/25/11 760; Eŭropo Mediteranea/ 19:30, 22:00/21/13 715; <<http://216.138.240.229/rc4>> (je la 15-a horo UTC), <http://roi.orf.at/esperanto/es_demand.html> (laŭ mendo tra la servilo de Austria Radio Internacia). **La redakcio kaj la eldonanto ne respondecas pri la opinioj de unuopaj aŭtoroj.**

La nova grafikisto de Kontakto prezentas sin

Kiel vi jam scias, ekde la antaŭa numero nia revuo havas novan grafikiston. Ni petis lin respondi kelkajn demandojn por niaj legantoj.

P. Moĵajev intervjuis Lucas Vignoli Reis

Kontakto: Kiu vi estas kaj de kie vi venas?

Lucas Vignoli Reis: Mi estas Lucas Vignoli Reis, mi loĝas kaj naskiĝis en Brazilo, en ĝia ĉefurbo Braziljo, kaj nun mi loĝas en Campinas proksime al San-Paŭlo.

K: Kio vi estas laŭ via profesio?

L: Mi estas tipografiisto kaj grafik-dezajnisto. Mi kaj aliaj 4 amikoj posedas entreprenon pri dezajno nomata "Preface Design". Oni povas trovi ĝin enrete ĉe <www.preface.com.br> (ankoraŭ ne estas versio en Esperanto). Tamen mi ne havas diplomon pri tio, formale mi ankoraŭ estas studento pri fiziko (iam mi ja finis tiun kurson). Mi ekinteresiĝis pri dezajno kiam mi partoprenis lecionojn pri tipografio ĉe la arta instituto. Laŭ mi, mia eks-instruisto estas la plej bona instruisto pri dezajno en Brazilo, (mi parolas pri Ph. D. Luís Cláudio Portugal Nascimento).

K: Kion vi faris/faras en Esperantujo? Kiujn aranĝojn vi partoprenis/kunorganizis?

L: Mi nun grafikas kaj kunredaktas la revuon de BEJO (Brazila Esperantista Junulara Organizo). Dum kelkaj jaroj mi ankaŭ gvidis neoficialajn lecionojn ĉe mia universitato.

La unua aranĝo, kiun mi partoprenis, estis la 2006-aj BKE kaj BEJK (Brazila Kongreso de Esperanto kaj Brazila Esperantista Junulara Kongreso) – tie mi venkis en la konkurso "BEJO-Ataŝeo" kaj gajnis ses-monatan vojaĝon tra Eŭropo kiel reprezentanto de la brazila kulturo al la Eŭropa Esperantujo. Tiam mi faris frenezan vojaĝon: dum ses monatoj mi vizitis 40 urbojn (iujn – kelkfoje) en 11 eŭropaj landoj, tie mi partoprenis multajn aranĝojn. La plej interesa restis IS en Germanio, kiu okazis tiam en kastelo. Tamen mi ĉeestis multajn aliajn interesajn aranĝojn: PSI, IJE, Primitiva Renkontiĝo, Jariĝo de ARCI-Esperanto, Germana Kongreso de Esperanto, HELA en Pollando, ktp. Por venki en la konkurso mi devis verki 40-paĝan sciencan monografion: "La Religiaj Baroj, Interkulturaj Defioj". Mi ŝuldas la sukceson de ĉi tiu vojaĝo al tiom multaj personoj, ke se mi dankus ĉiujn, mi plenigus tutan paĝon de *Kontakto*.



Lucas Vignoli tuj antaŭ la eko de sia odiseo en Esperantujo

K: Kiom longe vi abonas/legas/konas Kontakton?

L: Mi ne certas, sed mi pensas, ke jam de 3 jaroj mi havas kontakton kun Kontakto.

K: Kial kaj kiel vi decidis iĝi ĝia grafikisto?

L: Unue, ĉar mi ŝatas tipografion kaj tipografiumi revuojn kaj presitan materialon. Due, ĉar Rogener Pavinski, konatiĝinte kun mia laboro pri "Momenton!", ekdeziris, ke mi surprenu la taskon, ĉar li same kiel mi volas modernigi ĝian grafikan stilon.

K: Kiaj estas viaj spertoj pri grafikado antaŭ Kontakto?

L: 3 jaroj da studoj pri tipografio, kaj unu jaro da praktika laboro pri grafikado, interalie – grafikado de "Momenton!".

K: Kion vi volus ŝanĝi en la grafika aspekto de la revuo?

L: Preskaŭ ĉion. Kontakto delonge estas simila, mi vidis tiun artikolon pri la 30-jariĝo de Kontakto, ĝi aspektis same en la jaro de tiu artikolo. Mi planas anstataŭigi la nunan formulon ("tutkolora kaj fota front-paĝo kaj nigra-blanka enhavo") per dukoloraj enhavo kaj kovrilo. Ĉe "Preface Design" ni havas ilustristinon, kiu povos anstataŭigi la fotajn kovrilojn per artaj ilustraĵoj. Mi planas ankaŭ iomete malpligrandigi ĝian formon: nuntempe ĝi estas tro granda por 16-paĝa publikaĵo, tial la revuo estas tro mola kaj estas malkomforte ĝin legi. Post ioma malgrandigo la revuo povos havi 20 aŭ 24 paĝojn, pli da enaj tutpaĝaj fotoj – kaj estos multe pli komforte kaj ĝueble foliumebla.

Krom tio, rekonante la meritojn de la nuna grafika aspekto, necesas diri, ke ĝi tamen havas kelkajn ecojn, kiuj malhelpas la legadon. Unue, ĝiaj paĝoj estas tro dense plenigitaj: la enhavo pli similas ne al enhavo, sed al bruoj.

Mi planas iom aerumi la grafikspekton (iomete mi jam faris), plifaciligante la legadon de la revuaj paĝoj. Tio, certe, kaŭzos, ke eblos meti iomete malpli da enhavo sur la paĝojn, tamen la gajno de la legebleco estas tre grava (ekzistas studo, kiu pruvas, ke aldonado de iom da blanka spaco en ĵurnalojn kaj revuojn pligrandigas ilian legantaron). Ni havu iomete malpli da enhavo, tamen ĝi estu pli konciza kaj kvalita.

Alia afero, kiun mi planas, estas aldoni kelkfoje en ĝiajn paĝojn kelkajn ilustraĵojn, iom plimodernigi la stilon. Resume, la celo estas fari pli ĝueblan, belan kaj agrablan revuon!

K: Dankon pro viaj respondoj! Mi deziras al vi sukcesojn en la vivo kaj en via laboro por Kontakto!

ARTIKOLO

La ŝoka mistero de la Siksta kapelo

En la jaro 1475 nemalproksime de Florenco, en eta urbo Caprese, en la familio de Ludovico di Leonardo Buonarroti Simoni naskiĝis la dua filo, kiu ricevis la nomon Mikelanĝelo (Michelangelo). Samjare dum la papado de Siksto la Kvara oni komencis la konstruadon de la Siksta kapelo en Romo. Nuntempe la nomo de Mikelanĝelo estas monde konata kaj estas nedisŝireble ligita al la Siksta kapelo. Sciante la detalojn pri la vivo de la genia skulptisto, pentristo, arkitekto kaj poeto, oni ne povas ne miri pri tio, kia titana forto enestis en tiu nealta maldiketa homo. Ĝuste ĝi ebligis al li superi la malsukcesojn, ŝajne nevenkeblajn barojn kaj foje eĉ simple mokojn de la sorto, je kiuj riĉis la vivovojo de la majstro.

K. A. Efetov, Ukrainio


La granda Michelangelo Buonarroti (bildo 1) pripentris la Sikstan kapelon en du etapoj. Unue, plenumante la mendon de papo Julio la Dua (kiu estis nevo de Siksto la Kvara), li kovris per freskoj la plafonon de la kapelo (inter 1508 kaj 1512). Post dudek jaroj papo Klemento la Sepa ordonis al la majstro pripentri la altaran muron. Sed la laboro komenciĝis nur sub sekva papo – Paŭlo la Tria. En la jaroj 1536-1541 la pentristo kreas ĉi tie grandegan freskon “La Lasta Juĝo”. Mikelanĝelo famigis la kapelon, kaj la kapelo senmortigis la nomon de la pentristo.

Tamen multaj cirkonstancoj, ligitaj al la kreo de tiu majstroverko de Renesanco, ĝis nun estas ĉirkaŭitaj de mister-nebulo. En tiu ĉi artikolo ni provos trovi kelkajn respondojn.

La unua demando:

Kial la majstroverko estis kreata sen atestantoj?

En 1505 papo Julio la Dua decidis konstruigi por si grandiozan maŭzoleon en Romo. Li vokis Mikelanĝelon kaj komisiis al li efektiviĝi tiun projekton. La ideo pasiigis



B1 La dumviva portreto de Mikelanĝelo, pentrita de Jacopo del Conte.

la skulptiston, kiu jam kreis tiajn majstroverkojn, kiel “Pietà” (legu *Pjeta* – skulptaĵo, prezentanta mortan Kriston sur la brakoj de la dipatrino; 1498-1499) kaj “David” (1501-1504, rigardu la bildon sur la antaŭa kovrilpaĝo).

Pli ol ok monatojn Mikelanĝelo pasigis en Carrara, gvidante la laborojn pri minado kaj elfarado de marmoraj blokoj. Tamen, kiam la marmoro estis jam veturigita en Romon, la malamiko de Mikelanĝelo, arkitekto Donato Bramante (1444-1514) konvinkis la papon ĉesigi la laborojn pri la maŭzoleo. Julio la Dua estis superstiĉema, kaj Bramante lerte uzis tion, memoriginte al la papo, ke fari al si mem tombon dum la vivo estas tre malbona antaŭsigno. Kial la arkitekto tiel malamegis Mikelanĝelon? La skulptisto foje kulpigis la arkitekton pri ŝtelado dum konstru-laboroj en Romo. Verŝajnas, ke tio estis vera, kaj la vero, kiel oni scias, ne estas pardonata.

La ordono ĉesigi la laborojn pri la maŭzoleo ege humiligis Mikelanĝelon. Sed kiam li, elmontrinte iom superfluan persiston, petis la papon akcepti lin por ĉion klarigi, Julio la Dua simple rifuzis lin akcepti kaj ordonis al sia ĉevalisto forpeli la skulptiston. La duan humiligon Mikelanĝelo ne eltenis. Li pakis la aĵojn kaj forveturis en Florencon sen demandi la papan permeson. Por tio estis ankoraŭ unu grava kialo: Mikelanĝelo timis, ke Bramante planas mortigi lin.

La fuĝo de Mikelanĝelo furiozigis la papon; li sendis al li la ordonon reveni en Romon, sed la skulptisto ne obeis. Samtempe laŭ la instigoj de Bramante la marmoro, preparita por la maŭzoleo, estis ŝtelita. Julio la Dua kaj Mikelanĝelo interpaciĝis nur en 1506 dum la intervidiĝo en Bolonjo.

En la jaro 1508 la papo denove vokas la faman skulptiston en Romon. Estus logike supozi, ke Julio la Dua proponos al Mikelanĝelo fari iun novan skulptaĵon, tamen ne. Tiu sama Bramante, kiu patronis sian samlokanojn, junan Rafaelon (*Raffaello Sanzio*, 1483-1520), kaj volis forigi la konkuranton, sugestis al papo, ke tiu proponu al Mikelanĝelo pripentri la plafonon de la Siksta kapelo. La ideo de la malamikoj estis simpla. Unue: delogi la majstron de lia ĉefa afero – la skulptarto. Due, se li rifuzos, la papo koleros kontraŭ li. Trie, se Mikelanĝelo eĉ konsentos, plej verŝajne la skulptisto povos pentri nenion elstare bonan – kaj la supereco de Rafaelo iĝos senduba. Se konsideri, ke Mikelanĝelo ĝis nun preskaŭ ne okupiĝis pri freska pentroarto (se ne kalkuli la praktikadon en la metiejo de la florenca pentristo Domenico Ghirlandaio en 1488-1489), do estas facile kompreni, kial la skulptisto mem komence petis la papon transdoni tiun taskon al Rafaelo. Tamen Julio la Dua estis severe persista, kaj Mikelanĝelo devis konsenti.

Fakte, la tasko de la papo ne estis tiel malfacila. Li petis Mikelanĝelon prezenti la dek du apostolojn kaj plibeligi la restan parton de la plafono per iu ornamanto. Krom promesi bonan rekompencon por la pentristo mem, la papo konsentis pripagi la laboron de pliaj kvin helpantoj,

kiujn Mikelanĝelo povus elekti laŭ sia plaĉo. Mikelanĝelo komencis la laborojn, kune kun siaj helpantoj preparis la kartonojn kaj eĉ sukcesis pripentri parton de la plafono. Sed okazas io nekomprenebla. Subite li rifuzas ajnan helpon, liberigas la pentristojn kaj decidas fari la tutan laboron sola. Eĉ pli – li neniigas ĉion, kio estis jam farita! Mikelanĝelo neimageble malfaciligas sian taskon. Nun li estas tute sola, kaj anstataŭ uzi ornamantojn li planas kovri la tutan plafonon (preskaŭ 600 kvadratmetrojn) per la bildoj, ilustrantaj la Malnovan Testamenton.

Pri tio, kio okazis poste, bone verkis Stendhal:

Estas la okazo, sola en la historio de la homa spirito: oni igas la artiston dum kulmino de liaj kapabloj forlasi la arton, al kiu li ĉiam fordonis siajn fortojn, oni igas lin labori en alia tereno, kiel la unuan sperton oni postulas de li la laboron, kiu estas plej malfacila kaj granda laŭ siaj dimensioj, kaj li solvas tiun taskon dum tiel mallonga tempo, imitante nenium, sed mem kreinte ion neniam imiteblan kaj okupinte la unuan pozicion en tiu branĉo de la arto, kiun li neniam elektis!


Ekde tiam dum 3 jarcentoj [jam dum 5 jarcentoj – K. E.] okazis nenio, almenaŭ iomete simila al tiu heroaĵo de Mikelanĝelo. Imagu, kio devus okazi en la animo de la homo, kiu rilatis tiel skrupule al sia gloro kaj tiel severe – al si mem, kiam li aliris tiel grandan laboron sen scii eĉ la teknikon de la freska pentroarto. Imagu – kaj vi nepre agnoskos en li la spiritan forton, egalan, se eble, la grandiozecon de lia genio.

Sian heroaĵon la pentristo faris dum nur 26 monatoj (laborante kun interrompoj inter la 10-a de majo 1508 kaj 31-a de oktobro 1512). Li pripentris la plafonon, kuŝante surdorse aŭ side, retrokurbigante la kolon. En liajn okulojn gutis la farboj, la korpo pro la nenatura pozicio estis ŝirata de neeltenebla doloro. Condivi, la amiko kaj biografo de la artisto, atestas: pro tio, ke dum la laboro Mikelanĝelo devis konstante rigardi supren, li perdis la kapablon vidi, tenante la kapon rekte. Se li devis legi leteron aŭ pririgardi iun objekton, li devis levi ilin super la kapon.

Sed malgraŭ ĉiuj malfacilaĵoj Mikelanĝelo faris la pentraĵon, kiu laŭ sia grandiozecon, enhav-riĉo kaj perfekteco okupis la centran pozicion en la arto de la Alta Renesanco. Goete skribis: “Sen viziti la Sikstan kapelon estas malfacile imagi, kion kapablas krei unu sola homo”.

Vizitante la Sikstan kapelon kaj vidinte la freskojn de Mikelanĝelo propraokule, mi komprenis, pri kio parolis Goete. Verŝajne, en la homa lingvo mankas la vortoj, kiuj povus priskribi la fenomenon de Mikelanĝelo.

Sed kial do la pentristo decidis labori sola? Supozeble



B2 Fragmento de la fresko “La kreo de Adamo” post emfazo de kelkaj linioj mirinde similas la homan cerbon (komparu kun la bildo 3; kursive estas prezentitaj la latinaj ekvivalentoj de la anatomiaj terminoj).

li havis iun sekreton, kiun li ne povis malkaŝi eĉ al siaj plej intimaj amikoj. Oni havas ankoraŭ unu konfirmon por tio. Kiam Mikelanĝelo eksciis, ke nokte en la kapelon kaŝiris Bramante kaj Rafaelo por rigardi lian laboron, li furioziĝis kaj petis la papon forpreni de ili la ŝlosilojn, kio ja estis farita.

Eĉ de la papo mem Mikelanĝelo kaŝis laŭ siaj povoj la provizorajn rezultojn de sia laboro. Kiam Julio la Dua senaverte venadis en la kapelon, Mikalanĝelo, kiu laboris sur skafaldo, komencadis kvazaŭ senintence ĵetadi tabulojn de supre, kio igis la maljunan papon foriradi laŭeble pli rapide. Por ne ebligi al fremduloj eniri la kapelon Mikelanĝelo preskaŭ ne forlasadis ĝin: li venadis labori frumatene kaj foriris nur malfrue nokte.

La dua demando:

Kial tiel stranga prezentado?

Sur la fresko “La kreo de astroj kaj kreskaĵoj” (rigardu la bildon sur la malantaŭa kovrilpaĝo) la pentristo pro iu stranga kaŭzo prezentas ne unu, sed du bildojn de la Kreinto. Kial? Ja sur ĉiuj aliaj freskoj (“La apartigo de lumo disde mallumo”, “La apartigo de akvo disde sekaĵo”, “La kreo de Adamo”, “La kreo de Eva”) la Sinjoro estas unusola (kaj tio estas tute logika). Krome, en la maldekstra parto de la fresko “La kreo de astroj kaj kreskaĵoj” Mikelanĝelo prezentas Cebaoton, se uzi eŭfemismon, de la malantaŭa


vido. Tio estas tre stranga, tio rompas ĉiujn kanonojn kaj tradiciojn. Kaj laste – sur la aliaj freskoj la Kreinto havas vastajn vestojn, dum ĉi tie la ŝtofo strikte kovras la korpon. Por kio?

La tria demando:

Kion Mikelanĝelo ne opiniis “bagatelo”?

Sur la fresko “La Lasta Juĝo” Mikelanĝelo prezentis multege da nudaj korpoj. Sed en la jaro 1555 la papan seĝon okupas Paŭlo la Kvara, kiu postulas “kovri la hontindajn lokojn” de la prezentitaj figuroj. Tion faris Daniele da Volterra, kiu eĉ eniris la historion kiel *Braghettone* (“pantolon-faristo”). Mirige, sed Mikelanĝelo estis tute trankvila dum tio okazis. Romain Rolland tiel priskribis la strangan reagon de ĉiam eksplodema Mikelanĝelo, kiam lian freskon “La Lasta Juĝo” minacis mort-danĝero:

Li silentis, kiam lian kreaĵon oni nomis “luterana abomenindaĵo”. Li silentis, kiam Paŭlo la Kvara intencis detrui lian freskon. Li silentis, kiam Daniele da Volterra laŭ la ordono de la papo “vestis” la ĉefajn figurojn de “La Lasta Juĝo”. Demandite, kion li pensas pri tio, Mikelanĝelo respondis sen kolero, sed kun iom da moko kaj amaro: “Diru al la papo, ke tio estas bagatelo [la emfazo estas nia – K. E.], kiun estas tute facile ripari. Lia papa moŝto prefere zorgu pri



B3 La skemo de la supraĵaj strukturoj de la homa cerbo (kursive estas prezentitaj la latinaj ekvivalentoj de la anatomiaj terminoj).

ordigo de la mondo, ĉar doni al mia pentraĵo taŭgan aspekton estas tute simple.

Oni ricevas la impreson, ke la pentristo scias ion, pri kio la ĉirkaŭuloj eĉ ne konjektas; ion, kio ebligas al li trankvile rigardi la okazaĵojn. Sed kio estas tio?

La neatendita trovaĵo – homa cerbo!

Ni provu analizi ĉiujn ĉi strangaĵojn. Do, kion kaŝis Mikelanĝelo, pripentrante la plafonon de la Siksta kapelo?

Unu el la plej bonaj freskoj de la plafono estas “La kreo de Adamo” (rigardu la bildon sur la malantaŭa kovrilpaĝo). Sin apogante per la dekstra brako sur la tero kuŝas la juna kaj bela, sed ankoraŭ senspirita korpo de la unua homo. La kreanto Cebaoto, kiu flugas ĉirkaŭite de aro da senflugilaj anĝeloj, etendas sian dekstran manon al la maldekstra mano de Adamo. Ankoraŭ momento – kaj iliaj fingroj tuŝos unu la alian, kaj la korpo de Adamo iĝos viva, ekhavinte la animon. Priskribante tiun ĉi freskon art-scienistoj kutime rimarkas, ke Cebaoto kaj la anĝeloj, unuigitaj en unu tutaĵon, okupas sur la fresko tre taŭgan pozicion, trafe ekvilibrigante la maldekstran parton de la fresko. Jen ĉio.

Tamen, se ni fiksrigardos tion, kion kreis la pentristo, ni komprenos, ke Adamon vivigas ne nur Dio, prezentita kiel barbohava maljunulo, ĉirkaŭita de anĝeloj, sed ankaŭ Dio,

prezentita kiel grandega homa cerbo! Tion devas kompreni ĉiu biologo aŭ kuracisto, kiu scias la bazojn de anatomio (rigardu la bildojn 2 kaj 3). Tamen jarcento pasis post jarcento, sed nur post duonmiljaro la ideo de Mikelanĝelo iĝis por ni klara. La majstro ĉifris en sia fresko la ideon pri tio, ke la spiritigo estis farita de la Supera racio.

Sed kial dum la vivo Mikelanĝelo faris eĉ ne unu aludon pri tio, kion li prezentis? La klarigo estas memevidenta. La pentristo povis studi la anatomion de la cerbo nur farante nekropsiojn, kio tiutempe estis mortpunenda krimo. Se deksepjara Mikelanĝelo estus kaptita, kiam li kaŝe dissekcis kadavrojn en la mortul-ĉambro de la monaĥejo Santo Spirito en Florenco, jam sekvatage lia kadavro pendus en iu el la fenestroj de la Palazzo della Signoria – kaj la mondo neniam povus ekvidi liajn majstroverkojn. Inter tiu jaro 1492, kiam la pentristo studis la homan anatomion, kaj la kreo de la fresko pasis preskaŭ dudek jaroj. Sed malgraŭ tiel granda tempo la fideleco, kun kiu Mikelanĝelo prezentis la girojn kaj sulkojn de la cerbo, estas mirinda.

Unuafoje la similecon inter la fresko “La kreo de Adamo” kaj la homa cerbo rimarkis usona kuracisto Meshberger en 1990. Tamen li decidis, ke la granda majstro prezentis la internajn strukturojn de la cerbo. Mi tamen certas, ke Mikelanĝelo prezentis ĝian eksteran aspekton. Estas facile trovi la lateralan sulkon, kiu dividas la fruntan lobon de la cerbo disde la tempia. La supra kaj malsupra tempiaj

sulkoj limigas la mezan tempian giron. La dekstra brako de Cebaoto formas la mezan fruntan giron. La profilo de unu el la anĝeloj imitas la centran (aŭ Rolandan) sulkon, kiu estas limo inter la frunta kaj parieta loboj de la cerbo. Fine, la kapoj de la du anĝeloj malantaŭ la dorso de la Kreinto estas nenio alia, sed supramarĝena kaj angula giroj. Estas ankaŭ klare, kial ne estas prezentita la cerebela. Temas pri tio, ke la pentristo ne sciis pri la ekzisto de la elkreskaĵo de duramatro (konata kiel cerebela tendo), kiu troviĝas inter la cerebro (la granda cerbo) kaj cerebela. Tial dum elpreno de la cerbo el kranio Mikelanĝelo fakte forŝiradis la cerebelon. Tiun eraron ofte faras ankaŭ modernaj medicinaj studentoj dum siaj unuaj nekropsioj.

Necesas agnoski, ke la simileco inter la detaloj de la fresko kaj anatomio de la cerbo estas tre granda, por esti klarigebla per nuraj koincidoj.

Malpermesata liberemo

Sed tio ne estas ĉio. Tamen por daŭrigi la rakonton, necesas iom konatiĝi kun la ideoj de Mikelanĝelo pri tio, kio estas permesata al la artisto, kaj kio – ne.

Estas vaste konate, ke la granda pentristo ege ŝatis prezenti nudajn homajn korpojn, klare preferante la belecon de la vira korpo. La usona verkisto Irving Stone, kiu verkis rimarkindan biografian romanon pri Mikelanĝelo, enmetas en lian buŝon la jenajn vortojn: “Mi opinias, ke la tuta belo, la tuta homa forto troviĝas en viro. Rigardu lin, kiam li moviĝas, kiam li saltas, luktas, ĵetas lancon, plugas, levas ŝarĝon: ĉiuj muskoloj, ĉiuj artikoj, kiuj akceptas la streĉojn kaj la pezon, estas lokitaj ĉe li laŭ mirindaj proporcioj. Sed virino, laŭ mi, povas esti belega kaj ekscita nur en la stato de absoluta senmoveco.” Kiam la pentristo prezentas virinojn, li ofte pentras al ili la viran muskolaron. Sufiĉas rigardi almenaŭ la bildon de Kuma Sibilo en la Siksta Kapelo.

Mikelanĝelo prezentis nude Bakĥon, Davidon, grupon da militistoj sur la kartono “Batalo ĉe Cascina”, skulptaĵojn por la maŭzoleo de Julio la Dua, skulptaĵojn en la kapelo Medici, multajn figurojn sur la freskoj de la Siksta kapelo. Li prezentas nude eĉ Kriston! Ekzemple, la skulptaĵoj “Krucifikso” (1494) en la preĝejo Santo Spirito en Florenco kaj “Resurektinta Kristo” (1519-1520) en la preĝejo Santa Maria sopra Minerva en Romo prezentas la Filon tute nuda. Ne nur Kristo, sed ankaŭ la dipatrino kaj ĉiuj sanktuloj sur la fresko “La Lasta Juĝo” estis prezentitaj de Mikelanĝelo senvestaj. Jam poste, kiam elstara pentristo Paolo Veronese (1528-1588) estis inkvizicie juĝata pro la malpieco de lia pentraĵo “Festeno en la domo de Simono”, li defendis sin, menciante “La Lastan Juĝon”. Romain Rolland en sia libro pri la vivo de Mikelanĝelo mencias la jenajn vortojn de Veronese: “Mi konfesas, ke tio estas malbona, sed ripetas

tion, kion mi jam diris: mia devo estas sekvi la ekzemplon de miaj instruistoj. Mikelanĝelo en la papa kapelo en Romo prezentis la Savinton, lian plej sanktan patrinon, sanktan Johanon, sanktan Petron kaj aliajn sanktulojn, kaj prezentis ilin ja nudaj, eĉ la plej sanktan virgulinon Maria, kaj en la pozoj tute ne laŭkanonaj...”

Bernard Berenson (1865-1959), membro de la Usona akademio de artoj kaj literaturo, kiu la pli grandan parton de la vivo pasigis en Italio, tiel skribis pri la kreado de Mikelanĝelo: “Lia pasio estis la nuda naturo, lia idealo – la forto. Humileco kaj tolero estis same nekonataj al Mikelanĝelo, kiel al Danto, kiel al geniaj artistoj de ĉiuj epokoj. Eĉ havante tiajn sentojn, li ne povus ilin esprimi, ĉar liaj nudaj figuroj estas plenaj je potenco, sed ne malforto, je teruro, sed ne timo, je malespero, sed ne obeemo.”

Por kompreni la fontojn de la mondkoncepto de Mikelanĝelo necesas rememori, ke ekde la 14-a vivojaro (inter 1489-1492) li estis edukata en la kortumo de duko Lorenzo de Medici la Grandioza, kiu rimarkis la talenton de la knabo kaj proksimigis lin al si kiel adoptitan filon. Dank’ al tio la juna pentristo ekde la infanaĝo estis ĉirkaŭita de la antikvaj artaĵoj, ĉeestis la filozofiajn disputojn de la florenca Platona akademio. Lin ege influis la novplatonismaj filozofoj Marsilio Ficino (1433-1499), Giovanni Pico della Mirandola (1463-1494) kaj aliaj elstaraj reprezentantoj de la akademio.

Ficino alipripensis la platonismon kaj mistikajn instruojn de la malfrua antikveco kaj interpretis ilin akordige al la bazaj dogmoj de kristanismo. Lia apologio de la tera beleco kaj homa digno helpis superi la mezepokan asketismon kaj multe influis la evoluon de pentro-artoj kaj literaturo. Pico della Mirandola asertis, ke ĉiu homo kunigas en si la teran, bestan kaj dian originojn. En la rezonoj de Ficino, Pico kaj aliaj riveligis la plej ĉefa karakterizo de la humanisma antropocentrismo – la tendenco diigi la homon. Ficino, refutante la kristanan asketismon, interpretis la platonan eroton (la amon) kiel kre-impeton, kiel strebon de la homo al perfekteĝo, al supersensa belo.

La admirado de la antikva arto tamen ne forpuŝis la kristanan kredon de Mikelanĝelo. Dum lia tuta vivo la du malamikaj mondoj, pagana kaj kristana, interluktis por lia animo.

Romain Rolland skribas: “La granda kreanto de mirinde belaj formoj, la homo tre religiema, Mikelanĝelo akceptis la korpan belecon kiel ion dian; la bela korpo estas Dio mem, sin rivelanta en la korpa aspekto. Same kiel Moseo antaŭ la nebrulanta arbeto, Mikelanĝelo aliris tiun belecon kun plej respekta ekscitiĝo.”

Tial en la prezentado de la generaj organoj Mikelanĝelo vidis nenion kondamnindan. Li admiris ilin same kiel la aliajn partojn de la homa korpo – kaj homo ja estas



B4 Fragmento de la fresko "La kreo de astroj kaj kreskaĵoj" kun emfazitaj linioj de la figuro de Cebaoto. Se turni la bildon, la konturoj similos la virajn generilojn.



la plej perfekta estaĵo, kreita laŭ la bildo de Dio kaj simile al Dio. Sed tiun opinion estis tre malfacile defendi en la 16-a jarcento! La ceremoniestro de papo Paŭlo la Tria, Biagio da Cesena, tiel esprimis sin pri "La Lasta Juĝo": "Estas neimagebla malpieco prezenti en tiel sankta loko tiom da nudaj homoj, kiuj senpudore montras siajn hontindajn membrojn; tia pentraĵo taŭgas por banejoj kaj trinkejoj, sed ne por la papa kapelo". Mikelanĝelo responde metis la ceremoniestron en inferon en la formo de nuda Minoo kun azenaj oreloj. La korpo de Minoo estas ĉirkaŭvolvita de grandega serpento, kiu formordas lian penison. Kiam la ceremoniestro petis, ke la papo ordonu al la pentristo forigi tiun bildon, Paŭlo la Tria respondis: "Se li estus metinta vin almenaŭ en purgatorion, mi ja povus provi savi vin, sed li kaŝis vin en inferon, kaj mia regado ne validas en infero". Sed kiam ekregis Paŭlo la Kvara, "La Lasta Juĝo" denove iĝis minacata. Iumomente oni planis eĉ tute detruji la freskon. Feliĉe, oni nur "vestis" kelkajn nudajn korpojn.

Kaj jen alia vaste konata fakto: kiam en 1504 Mikelanĝelo finis la laborojn pri la skulptaĵo de nuda Davido, oni devis gardi ĝin, ĉar la urbanoj ĵetadis ŝtonojn kontraŭ la skulptaĵo. La ĉasta nudeco de Davido iritis la pudoron de florencanoj. En certa periodo oni eĉ kovris la "hontindajn partojn" de la skulptaĵo per oraj folietoj. Bedaŭrinde, la bigota psikologio malmulte ŝanĝiĝis ekde tiu tempo. Antaŭnelonge oni "vestis" eĉ la skulptaĵon de Resurektinta Kristo...

La ŝoka trovaĵo – kaŝitaj gener-organoj!

Do, la sintenon de Mikelanĝelo rilate la prezentadon de la nudaj korpoj oni neniel povas nomi puritana; tamen eĉ li neniam permesis al si nudprezenti la Dion-Patron. Tia sakrilegio povus kosti al li la vivon. Sed ni atente rigardu la freskon "La kreo de astroj kaj kreskaĵoj" (rigardu la bildon sur la malantaŭa kovrilpaĝo). Kial do Cebaoto estas prezentita de malantaŭe kaj kial la ŝtofoj tiel strikte ĉirkaŭvolvas certajn partojn de lia korpo? Ni provu, sen ion krompentri, simple emfazi certajn liniojn de Mikelanĝelo kaj turni la bildon (ja ĝi troviĝas sur plafono, do, oni povas rigardi ĝin de ajna flanko; rigardu la bildon 4). Post tio iĝas evidente, ke la pentristo prezentis grandegajn virajn generilojn (duon-erektan penison kaj testikojn) – la longo de la bildo estas preskaŭ metro kaj duono. Ni rimarku, ke de la anatomia vidpunkto ĉio estas prezentita tre fidele. Al medicinistoj estas konate, ke la maldekstra testiko ofte troviĝas iom sub la dekstra – tio facile videblas dum simpla pririgardo de skroto. Mikelanĝelo, kiu perfekte sciis anatomion, prezentis la skroton ĉe la skulptaĵoj "Davido" kaj "Resurektinta Kristo" ĝuste tiamaniere. Same estas prezentitaj la generiloj sur la fresko "La kreo de astroj kaj kreskaĵoj": la dekstra parto de la skroto troviĝas iom super la maldekstra. La koincido de eĉ tiel etaj detaloj forigas ĉiujn dubojn pri tio, kion prezentis la pentristo.

Krome, sur la sama fresko ni vidas la bildon de la virinaj generiloj, kiuj troviĝas ĝuste kontraŭ la vira penis. La detaloj, kiel klitorio, grandaj kaj malgrandaj vulvaj labioj, vulva fendo, estas tre zorge prezentitaj (rigardu la bildon 5).



Estas do tute klare, ke sur la fresko Mikelanĝelo kaŝe prezentis gigantajn bildojn de generaj organoj. La aludoj kaj kaŝhelpoj, kiujn li donis al ni kaj per tuta sia kreado, kaj per la simboloj en la kapelo mem, estas ja tre multaj: multnombraj nudaj figuroj sur la plafono kaj la altara muro, kapo de serpento, klare montranta la penison de Minoo, pri kio ni jam parolis.

Kial do ĝuste la cerbo kaj generiloj? La afero estas, ke la informo, kiun la raciaj estaĵoj povas transdoni al la sekvaj generacioj, apartenas al la du ĉefaj tipoj:

1. La gena aŭ heredeca informo – ĝi estas transdonata de la gepatroj al la idoj per generiloj. Penisio estas nenio alia, sed injektilo, kiu plenumas la enigon de DNA en la patrinan organismon.
2. La neheredeca informo – ĝi estas transdonata de unuj generacioj al la aliaj helpe de la cerbo, kiu kreas kaj reproduktas la informon forme de artaĵoj, buŝaj kaj skribaj tekstoj, filmoj ktp.

Tial estas nenio mirinda, ke Mikelanĝelo emfazis ĝuste la generilojn kaj la cerbon. Lia ideo estas klara: dum la kreado komence agis la fekundiga elemento (la generiloj) kaj nur poste – la spiritiga elemento (la cerbo, kiu vivigas la homan korpon).

Nun iĝas klare, kial Mikelanĝelo tiel trankvile reagis, kiam Daniele da Volterra laŭ la ordono de la papo kripligis per sia drapirado “La Lastan Juĝon”. La majstro simple ridis en la animo pri la musa aktivado de la blinduloj, kiuj ne sukcesis rimarki la ĉefajn simbolojn sur liaj freskoj.

Dum la vivo Mikelanĝelo ne sukcesis malkaŝi sian sekreton. Super lia kapo ekŝvebis la glavo de inkvizicio. Ni rememoru, ke en 1540 en Romo estis oficialigita la ordeno de jezuitoj, kaj en 1542 estis fondita la kongregacio de la sankta inkvizicio. La malamiko de Mikelanĝelo, verkisto Pietro Aretino, preparis denuncon, en kiu li kulpigis la majstron pri herezo. En sia letero al Mikelanĝelo li minacis denunci la pentriston al la inkvizicio. Tiun leteraĉon Mikelanĝelo ne respondis, opinante ke ne indas kontraŭbatali la malamikojn, se tia venko ne donos honoron. Li respondis nur per sia arto. Sur la fresko “La Lasta Juĝo” ni povas trovi ankoraŭ unu simbolon (rigardu la bildon 6). Jen kion rakontas pri tio art-sciencisto Andreo Guber: “... Sur la haŭto, kiun tenas Bartolomeo per la maldekstra mano, oni trovis la memportreton de Mikelanĝelo mem, kaj en Bartolomeo – la similecon al Pietro Aretino. Se tio estas vera, oni povas nur miri pri la kuraĝo de Mikelanĝelo: en unu el la plej atentokaptaj lokoj de la altara muro li prezentis kiel sanktan martiron sian ĉefan malamikon kun tranĉilo enmane, ĵus deŝirintan la haŭton de Mikelanĝelo mem.”

La granda majstro konstante balanciĝis sur raz-klingo, tamen restis netuŝita. Kontraŭ fajro, veneno, maŝo kaj tranĉilo lin savis nur la geniececo – ja la papoj devis konstruigi katedralojn kaj maŭzoleojn, ornami per freskoj murojn kaj plafonojn de kapeloj kaj palacoj. Sed se ili eksciis la sencon de la kaŝita mesaĝo de Mikelanĝelo, lin, verŝajne, savus nenio. Tial li estis devigita preni la sekreton kun si, esperante nur pri nia divenemo.



87 La desegnaĵo "Ambigua bopatrino", farita de usonaj psikologoj E. G. Boring kaj R. W. Leeper. Oni povas ekvidi ĉi tie jen junulinon, kiu rigardas for de ni, jen maljunulinon kun granda nazo.

Simboloj, kaŝ-bildoj kaj surrealismo

Do, en la kreaĵoj de la granda majstro ni trovis du artifikojn, kiuj nun estas vaste konataj kaj estas ofte uzataj de pentristoj-surrealistoj. La unua estas konata kiel "duobla bildo" aŭ "dusenca bildo" – kiam fiksrigardinte la bildon la rigardanto subite trovas alian, ofte kaŝitan sencon (rigardu la ekzemplon sur la bildo 7). Sur la freskoj de Mikelaĝelo tio estas la bildo de la homa cerbo. La dua artifiko estas iom pli komplika: por ekvidi la kaŝitan bildon oni devas turni la pentraĵon je 180 aŭ, malpli ofte, je 90 gradoj (foje – je alia angulo) – la t.n. "turno-bildoj" (rigardu la ekzemplon sur la bildo 8). Tia bildo estas prezentita sur la fresko "La kreo de astroj kaj kreskaĵoj". La fresko estis kreita en 1511 – plej verŝajnas, ke ĝuste Mikelaĝelo estis la unua artisto, kiu uzis tiun artifikon.

La arton de la granda florencano atente studis la klasikulo de surrealismo Salvador Dalí (1904-1989). Pri tio atestas la serio de pentraĵoj, inspiritaj de la Mikelaĝelaj bildoj (estu menciitaj nur "Pietà" kaj "Figuro, inspirita de Adamo de sur la plafono de la Siksta kapelo"). En sia kreado Dalí ofte uzis la duoblajn bildojn: ekzemple, sur la pentraĵoj "La nevidebla homo", "La granda paranojulo", "La bildoj malaperas", "Sklav-bazaro kun malaperanta busto de Voltaire". Lia pentraĵo "Cignoj, spegulantaj elefantojn" povas esti konsiderata kiel turno-bildo.

Parolante pri la duoblaj bildoj oni ne povas ne menci i ankoraŭ unu pentriston de la 16-a jarcento – Giuseppe Arcimboldo (1527-1593). Li naskiĝis en Milano, sed la pli grandan parton de la vivo li pasigis en Prago, servante al imperiestroj Habsburgoj. Ekde 1563 li kreis aron da



88 La ekzemplo de turnobildo. Se rigardi ĝin en diversaj pozicioj oni povas vidi jen la homan, jen la ĉevalan kapon.

nektimaj pentraĵoj, kiuj prezentas duoblajn bildojn: portretojn, kiuj estas formitaj el fruktoj, floroj, legomoj, fiŝoj, birdoj, mamuloj, libroj ktp. Giuseppe Arcimboldo uzis ankaŭ turnobildojn, kaj Salvador Dalí eĉ nomis lin "anticipanto de surrealismo". Tamen mi pretas aserti, ke eĉ pli frua anticipanto de surrealismo estis Mikelaĝelo, kiu uzis la duoblajn bildojn kaj turnobildojn 50 jarojn antaŭ Arcimboldo kaj ankaŭ atribuis al tiuj bildoj profundan filozofian sencon.

Sed ĉu eblas trovi la ĉifritan informon en aliaj kreaĵoj de Mikelaĝelo? Ja estas tre malfacile supozi, ke la majstro uzis la kaŝitajn simbolojn nur en la Siksta kapelo. Tamen, se oni atente analizas la kreadon de la genia florencano, oni povas trovi ian sekreton preskaŭ en ĉiu lia artaĵo – multaj el ili estas jam konataj al art-sciencistoj. Ekzemple, ni rigardu la skulptaĵon "Pietà": la dipatrino tenas ĉe la sino la korpon de tridektri-jara Jesuo. Sed ni rigardu ŝian vizaĝon – kaj ni vidos, ke Mikelaĝelo prezentis la patrinon, kiu estas pli juna, ol ŝia filo! Kiam oni demandis la skulptiston, kiel tio eblas, li respondis: "La virgeco donas freŝon kaj eternan junecon". La juneco de la dipatrino estas simbolo de venko super la tempo kaj morto.

Se oni rigardas la ideale bon-proporcian "Davidon", oni baldaŭ fiksas la rigardon al la dekstra mano, kunpremanta la ŝtonon, kiu post momento mortigos Goljaton. Mikelaĝelo intence prezentis la dekstran manon iom pli granda, kompare al la aliaj korpopartoj. Tio estas la kaŝita simbolo, kiu ne lasas dubi: la venko estas jam antaŭdecidita! Plie, ankoraŭ unu artifiko rilatas al la aĝo de Davido. En la Biblio estas skribite, ke dum la batalo kontraŭ Goljato li estis juna knabo. Li estis tiel malgranda, ke batalis kontraŭ la malamiko nuda, ĉar la milit-vestoj de caro Saulo estis por li tro grandaj. Ĝuste tiel Davido estis prezentata fare de la antaŭuloj de Mikelaĝelo. Sufiĉas rigardi almenaŭ la skulptaĵon, faritan de Donatello: ĝi prezentas junuleton kun sufiĉe malfortika korpa konstitucio; interalie, pro siaj ĉapelo, longaj haroj kaj infana figuro li eĉ similas knabinon. Davido de Mikelaĝelo estas plenkreska homo

(multe pli aĝa, ol la biblia Davido) kun fortikaj muskoloj, pli simila al Herkulo aŭ Apolono. Ankaŭ tio havas certan sencon: ja nesenskaŭze giganto Davido de Mikelanĝelo (la skulptaĵo altas 4,54 metrojn) estas simbolo de nevenkeblo de la Florenca respubliko.

Ankoraŭ unu sekreto troviĝas en la skulptaĵo, prezentanta dukon Giuliano de Medici (ĉ. 1533); la skulptaĵo troviĝas en la kapelo de Medici en Florenco. La duko regis tre nelonge, sed “famiĝis” per sia partopreno en sanga restarigo de Medici-regado en Florenco. La vizaĝo de la skulptaĵo tute ne similas la portreton de la reala duko. La majstro per tia manovro demonstris sian plenan indiferentecon al la aspekto de la prezentata homo, montrinte per tio ankaŭ sian indiferentecon al li kiel al historia figuro. Kiam oni riproĉis Mikelanĝelon pri manko de la simileco, li diris: “Nun li ja ne estas simila, sed post ĉirkaŭ cent jaroj ĉiuj imagos lin nur tia”.

Pri la simboloj sur la fresko “La Lasta Juĝo” ni jam parolis: Biagio da Cesena, prezentita kiel nuda Mino, kiu antaŭ niaj okuloj perdas sian viran organon, kaj la fiulo Aretino, deŝirinta la haŭton de la pentristo mem.

Fine, ni rigardu la unuan skulptan artaĵon de Mikelanĝelo – la reliefon “Madono ĉe ŝtuparo” (rigardu la bildon sur la malantaŭa kovrilpaĝo). Antaŭe sidas la dipatrino kun bebo Jesuo. Malantaŭ ŝi videblas la ŝtuparo, sur kiu, apoginte sin sur la balustrado, staras knabo Johano (onta Johano la Baptisto). La elementoj de la skulptaĵo estas kunaranĝitaj tiel, ke la balustrada trabo, simila al la bazo de la kruco, sur kiu oni mortigos Kriston, malsupre tuŝas la manon de Maria. La dekstra mano de Johano, metita perpendikle al la balustrado, plifortigas la similecon de la tuta strukturo al la kruco. La ideo de la simbolo estas jena: Maria akceptis sur sin la tutan pezon de la kruco, kiu estos (kaj ŝi ja scias tion) mortigilo por ŝia sola Filo. Tiu artaĵo estis kreita en 1490 – la juna skulptisto estis nur dekkvinjara!

La lastaj vortoj de okdeknaŭ-jara Mikelanĝelo sur la mortolito estis jenaj: “Kia domaĝo, ke mi devas morti nun, kiam mi ĵus ellernis legeti en mia profesio”. Ni povas kun malĝojo aldoni ja jenon: “Kia domaĝo, ke nur post 500 jaroj ni lernas legeti tion, kion donacis al ni la granda Majstro”.

El la rusa tradukis P. Moĵajev

RETE

Kelkaj ekzemploj de duoblaj bildoj kaj turnobildoj:

- <http://gluk.blin.com.ua/page6.php>
- <http://gluk.blin.com.ua/page9.php>
- <http://opticalillusion4u.webs.com/faces.htm>



Prof. K. A. Efetov, Ukrainio

La aŭtoro de tiu ĉi artikolo estas biologo, biokemiisto kaj kuracisto, loĝanta en Krimeo, Ukrainio. Li estas doktoro de biologiaj sciencoj, merita aganto de scienco kaj tekniko de Ukrainio, profesoro de la Krimea ŝtata medicina universitato, kie li estras la departamenton de biologia kemio kaj laboratorion de bioteknologio. La ĉefaj sciencaj interesoj de K. A. Efetov estas molekula imunologio, evolucia biologio kaj biosistematiko. Li proponis uzi proteinojn kaj peptidojn de insektoj kiel molekulojn-sondilojn por esplori la homajn proteinojn en normaj kaj patologiaj statoj. Li ankaŭ fondis novan sciencon koncepton – la t.n. unuklonan imunossistematikon, kiu ebligas pritaksi la biologian parencecon inter diversaj specioj surbaze de pristudo de iliaj proteinoj per la uzo de la unuklonaj antikorpoj. K. A. Efetov malkovris kaj priskribis 25 biologiajn speciojn, li estas aŭtoro de pli ol 300 sciencaj verkoj kaj 12 patentitaj inventoj.

Krom pri sia fako, K. A. Efetov serioze interesiĝas pri historio kaj arto. La prezentita artikolo, kiun la aŭtoro afable permesis traduki al Esperanto, estas la rezulto de liaj esploroj, efektivitaj ĉe la intertuŝ-punkto de biologio kaj artologio. La ideoj de la aŭtoro, publikigitaj forme de kvar libroj (en la rusa, germana kaj angla lingvoj), estas jam aktive pridiskutataj en la reto kaj eĉ estis uzitaj por unu el la demandoj de la monda ĉampionado pri la intelekta ludo “Kio? Kie? Kiam?”.

La aŭtoro ĝojos ekscii vian opinion pri la artikolo kaj la prezentitaj ideoj. Viajn reeĥojn en la rusa aŭ angla lingvo bonvolu sendi al la adreso <konst@efetov.crimea.ua>. Viajn leterojn en Esperanto bonvolu sendi al nia redakcia adreso <kontakto@tejo.org>, ni nepre transdonos la leterojn al la aŭtoro.

Pafklikado kaj brua fekado

“Fek al Esperanto”, muzik-albumo kun 18 titoloj, suma daŭro 52 minutoj, karaoke-versioj de 14 titoloj, tekstolibreto, eld. Vinilkosmo, 2009

Paŭlo Moĵajev, Ukrainio

Jen la nova muzik-albumo, eldonita de Vinilkosmo. Ĉi-foje temas iusence pri unika disko, ĉar ĉiuj komponaĵoj sur ĝi estas repaj. Do, mankas melodioj, sed anstataŭe onin atendas la preskaŭ senhalta fluo de rimitaj paroloj. La albumon registris la franca hiphopa grupo “La Pafklik”, kiun konsistigas du homoj, sin kaŝintaj per la kromnomoj Platano kaj Katakana. Certe, jam pro la fakto, ke temas pri la unua repa-hiphopa albumo en Esperanto, la disko estas atentinda.

Sed ĝi tamen estas atentinda ne nur pro tio, ke ĝi estas la unua. Mi diru sincere, ke mi ne estas ŝatanto de tiaspeca “muziko”, tamen mi estis agrable surprizita. La komponaĵoj estas sufiĉe variaj muzike kaj stile: aŭdeblas muzikoj jen hardkoraj, jen iom psikedelaj, jen pli-malpli “mildaj”, eĉ kun aldonaj virinaj voĉoj. La albumo do aŭskulteblas sen tredo, sed ankaŭ sen multe da raviĝo – krom 1-2 esceptoj malfacilas diri, ke la muziko iel speciale eniris la memoron. Kompreneblas, ke en tiu genro pli gravas la tekstoj.

Feliĉe ankaŭ la tekstoj agrable mirigis min per sia nebanaleco kaj relativa glateco. La temaro de la tekstoj estas ĝenerale kritika: la kantistoj-parolistoj kritikas la modernan politikan sistemon, la modernan mondon kaj modernan viv-manieron kun tro da teknikaĵoj, kiuj malhelpas al la homoj vivi home. Finfine, ne malmulte da kritiko ricevas Esperanto kaj Esperanto-movado mem (ekzemple, estas kritikataj la tradiciaj Esperantaj kutimaĵoj kiel la verda stelo kaj La Bamba, ĉiam renkontataj kun preskaŭ rita stabileco; porcion da galo ricevis ankaŭ la fiaskinta projekto pri Internacia Televido). Kelkaj komponaĵoj temas pri laŭdado de la grupo kaj albumo mem; ne maloftas mencioj pri anarkio, kanabo kaj similaj karakterizaĵoj de la modernaj “subgrundaj” junularaj movadoj. Tute ne ĉiam la kritikoj kaj laŭdoj estas esprimataj per decaj vortoj, do pruduloj pripensu speciale, ĉu aŭskulti la albumon aŭ ne.

Aparte amuzis kaj ĝojigis min la fakto, ke meze de tiel “koncepta” albumo, kies ĉefa ideo estas kritiki, acidi kaj verŝi galon, troveblas kelkaj “ekstertemaj” kaj eĉ humuraj momentoj. Kelkloke la tekstoj ŝajnas polemiki kun la aliaj grupoj, popularaj inter junaj esperantistoj. Ekzemple, la komponaĵo “La Pafklik” ŝajnas kontraŭbatali la Dolcxamaran “Ĉu vi pretas por la veno de Dolcxamar?”:



“Ni jam estas klasik’, konataj de Ĉinio ĝis Afrik’, kaj nun vi konas la Pafklikon”. La frazo “En Esperantio mi estas kvazaŭ sola, sola” (el la komponaĵo “Fek al Esperanto”) evidente aludas la faman kanton de Amplifiki “Sola”. Krom la voĉoj de la grupanoj sur la disko eblas aŭdi la voĉon de fama pola esperantisto Ireneusz Bobrzak (en la rolo de radio-parolisto), la voĉon de la eksa Rusia prezidento Putin, kiu promesas mortigi teroristojn eĉ en necesejoj; la komponaĵo “Tro da fungoj” estas plene farita el pecoj de iam furora instrua filmo “Mazi en Gondolando”. Finfine, mi eĉ ridetis, aŭskultinte la trakon “La Espero”: tie oni komence aŭdas la alvokon (supozeble parolas H. Tonkin) ekstari kaj ekkanti la himnon, poste sonas la unuaj frazoj, sed ĉio abrupte finiĝas per eksplodo, pafsonoj kaj timigitaj jelpoj. Ĉu tro sakrilegie? Miaopinie – tute ne, nur amuze.

Kiel mi jam diris, la tekstoj entute estas pli-malpli bonaj sence kaj eĉ tolereblaj gramatike, se ne konsideri la fojfojan elizion de la a-finaĵo ĉe adjektivoj (“Kio estas nov?”) kaj nemultajn (sed kelkfoje krudajn) sporadajn erarojn. Mi menciu nur kelkajn: “Dum malriĉuloj sin dronas” (anst. “dronas” aŭ “sin dronigas”, depende de la senco), “Ili konsideru tion kiel nia imposto” (anst. “kiel nian imposton”), “Eble la solvo estas ĉi ĉion foriri” (anst. “foriri de ĉio ĉi”). La vera plago por la albumo estas la prononco, kiu entute

estas ege malklara: la tekstoj estas parolataj tute senzorge, sen eĉ eta peno plifaciligi ilian komprenon por la aŭskultantoj. Kelkajn kantojn tute ne eblas kompreni sen la helpo de la tekstolibreto pro kelkaj misprononcataj konsonantoj kaj multegaj, terure multegaj mislokitaj akcentoj. Tiel malzorga rilato al la prononcado preskaŭ mortigas la entute pozitivan impreson pri la disko – ĉu vere tiel malfacilas eĉ *paroli* (ja ne temas pri kantado, do la ritmo de la parolo povas esti ege variebla) sen malobei tiel simplan Esperantan regulon pri la akcento?

Resumante eblas diri, ke la disko estas nemalbona donaco al la Esperanto-komunumo, kiu ekde nun povos fanfaroni, ke ankaŭ repaj diskoj ja ekzistas en Esperanto.

Kelkaj komponaĵoj kaj frap-frazoj (kiel, ekzemple, “*Bum bum kanabis, bum bum kanabas*” kun akcentataj lastaj silaboj) certe iĝos popularaj inter la junaj esperantistoj. Tamen, la populareco povus estis multe pli granda, se la albumo ne estus tiel strikta- kaj specif-tema, kaj la prononcado – tiel senzorga. Nepre aŭskultu la diskon, se vi ŝatas repon aŭ estas jun-kora muzik-ŝatanto, preta digesti kion ajn. Prudaj plenkreskuloj ĝin nepre evitu. Ĉiuj ceteraj decidu mem; espereble tiu ĉi recenzo helpos al vi fari la ĝustan decidon. Konsideru ankaŭ ke kun kelkaj el la muzikaĵoj jam nun eblas konatiĝi ĉe la paĝo <<http://www.myspace.com/lapafklik>>.

ŜERCO

Ŝercoj

Olubunmi Osho-Davies, Nigerio

facila

Viro, kiu ege **balbutis**, aliris knabinon ĉe la aŭtobusejo, kaj ekparolis al ŝi: “K-knab-bino, vi estas be-be-bela. Mi v-v-volus esti via e-e-edzo. Bonvolu re-respondi, ĉu-ĉu vi v-v-olus esti mia e-e-edzin-no?”

La knabino silentis dum longa tempo kaj finfine respondis: “V-vi bal-bal-bu-butis, ank-k-kaŭ mi bal-balbutas. Se do ni kun-kun-ed-d-dziĝus, niaj ge-ge-gefiloj neniam povos paroli. Mi do res-s-spondas, ke ne.”

Estis unu knabo, kiu estis tre malsaĝa kaj ne sci-povis kalkuli. Iam oni demandis lin, kiom estas sep kaj ok. La knabo nur malsaĝe rigardis, ĝis alia knabo, kiu bone sciis, ke li ege ŝatas monon, tiel ĉi faris la demandon: “Kiom estas sep **dolaroj** kaj ok dolaroj?”. Kaj la knabo tuj respondis: “Jen simpla demando, sep dolaroj kaj ok dolaroj estas dek kvin dolaroj.”

Tri viroj, kiuj nomis sin **pastroj** de diversaj religioj, decidis montri al ĉiuj per mirindaj faroj, ke ili ja estis servantoj de Dio, ĉar delonge oni parolis, ke ili estas malveraj pastroj. Ili decidis promeni sur akvo same kiel Jesuo faris.

Fine venis la tago, kiam ĉiu el ili devis promeni sur akvo por preni aĵon, kiun oni metis ie for de la bordo. La unua iris kaj sukcese promenis sur la akvo kaj alportis la aĵon al la bordo. La ĉeestintoj laŭdegis lin. Ankaŭ la dua sukcese faris la samon. Sed la tria faris multajn klopodojn, sed dum ĉiu provo li devis re-veni ĉar li subakviĝis. La ĉeestintoj do ekmokis lin.

Finfine unu el la aliaj pastroj alparolis la alian: “Kara amiko, ni savu nian amikon, nian karan malveran pastron de la mokado. Sen-dube ni ĉiuj estas malveraj, ni do ne lasu al li mortigi sin penante promeni sur akvo. Ni montru al li la ŝtonojn, sur kiuj ni promenis por ke ankaŭ li ŝajnu sukcese promeni sur la akvo”.

VORTARETO

balbuti – paroli kun malfacilo

dolaro – speco de mono

pastro – homo, kies laboro estas fari religiajn farojn kaj esti peranto inter la homoj kaj dio

Subtenu la agadon de TEJO!

Ekzistas multe da ebloj helpi TEJO en ĝia agado. La plej gravaj estas membriĝi aŭ patroniĝi. Sed vi povas helpi ankaŭ al konkretaj agaderoj de TEJO.

Mondonacojn al ĝenerala agado de TEJO bv. pagi la UEA-konto "tejtej" (indiku la celon de la donaco, ekz: "donaco por KER" aŭ "donaco por landa agado"). Ankaŭ eblas fari donacon por specifaj celoj:

- Fonduso "Partoprenu IJKon" – per ĝi TEJO subvencias la partoprenon de TEJO-aktivuloj en IJK;
- Pasporta Servo – eble la plej fama eldonaĵo de TEJO.

Por pliaj detaloj pri pagmanieroj, bv. rigardi ĉe <www.uea.org/alighoj/pag_manieroj.html> aŭ demandi ĉe la Centra Oficejo.

TEJO dankegas vin pro via subteno!

JUNA AMIKO – Internacia E-revuo de ILEI por lernejoj kaj komencantoj

- aĝas 30 jarojn kaj aperas 3-foje (aprilo, septembro, decembro) sur po 52 plurkoloraj paĝoj kun plenkoloraj kovriloj;
- havas kunlaborantojn el ĉiuj kvin kontinentoj;
- rabato ĝis 50%!

Karakterizas ĝin:

Modela stilo kaj facila lingvaĵo (1500 vortradikoj sen glosoj), *enhavo tre varia*: rakontoj, fabeloj, raportoj, informoj, interesaĵoj, enigmoj, kvizoj, versaĵoj, ludoj, kantoj, humuro, lingvaj konsiloj, interkulturo, kuriozaĵoj, voĉo de legantoj k.a. kun multaj ilustraĵoj.

JUNA AMIKO estas fonto de taŭgaj legaĵoj por komencantoj, fidinda helpilo por E-kursgvidantoj.

Vizitu nian TTT-ejon: <www.junaamiko.inf.hu> aŭ en <www.lernu.net>!

ĈU VI SERĈAS KORESPONDAMIKON?

Sendu al Koresponda Servo Mondskala jenajn detalojn: nomo, adreso, sekso, aĝo, profesio, geedza stato, kiom da korespondantoj vi deziras, en kiuj landoj kaj pri kiuj temoj.

Kunsendu 2 internaciajn respondkuponojn, aŭ, se ili ne estas aĉeteblaj en via lando, ne uzitan poŝtmarkon. KSM pludonos viajn informojn al alia(j) korespondemulo(j), kiu(j) konformas al viaj deziroj. Vi ricevos rektan respondon. KSM estas servo de UEA.

Skribu: **Koresponda Servo Mondskala, B. P. 6, FR-55000, Longeville-en-Barrois, Francio**

KOTIZTABELO DE UEA POR 2009

MG Membro kun Gvidlibro tra la Esperanto-movado

MJ(-T) Membro kun Jarlibro (kaj, ĝis inkl. 29 jaroj, membro de TEJO kun la revuo Kontakto sen plia abonpago)

MA(-T) Membro-Abonanto: kiel MJ(-T) plus la revuo Esperanto

MA ricevas la Jarlibron, la revuon Esperanto, kaj, ĝis inkl. 29 jaroj, la revuon Kontakto

SA Simpla abono al la revuo Esperanto, sen membreco en UEA

Kto Abono al la revuo Kontakto, sen membreco en UEA/TEJO


SZ Kotizo por Societo Zamenhof: mecenata kategorio (aldoniĝas al alia kotizo; ne inkluzivas membrecon en UEA)

Lando/valuto	MG	MJ(-T)	MA(-T)	SA	Kto	SZ
Aŭstralio/dolaro	16	40	100	60	56	200
Aŭstrio/eŭro	10	24	59	38	23	118
Belgio/eŭro	10	24	59	38	23	118
Brazilo/eŭro	5	12	30	18	11	60
Britio/pundo	7	18	45	29	18	90
Ĉeĥio/krono	170	420	1050	670	425	2100
Danio/krono	70	175	440	280	180	880
Estonio/krono	100	240	600	380	245	1200
Finnlando/eŭro	10	24	59	38	23	118
Francio/eŭro	10	24	59	38	23	118
Germanio/eŭro	10	24	59	38	23	118
Greklando/eŭro	10	24	59	38	23	118
Hispanio/eŭro	10	24	59	38	23	118
Hungario/forinto	1600	4000	10000	6400	4000	20000
Irlando/eŭro	10	24	59	38	23	118
Islando/eŭro	10	24	59	38	23	118
Israelo/eŭro	7	18	45	27	16	90
Italio/eŭro	10	24	59	38	23	118
Japanio/eno	1500	3700	9200	5500	3300	18400
Kanado/dolaro	14	34	86	52	31	172
Latvio/lato	4	11	27	17	11	54
Litovio/lido	20	50	130	80	50	260
Nederlando/eŭro	10	24	59	38	23	118
Norvegio/krono	75	190	470	280	170	940
Nov-Zelando/dolaro	20	50	125	75	45	250
Pollando/zloto	20	50	130	80	50	260
Portugalia/eŭro	8	20	50	32	20	100
Rusio/eŭro	5	12	30	18	11	60
Slovakio/eŭro	7	17	42	27	17	84
Slovenio/eŭro	7	18	45	29	18	90
Svedio/krono	90	220	550	350	220	1100
Svislando/franko	15	38	95	57	34	190
Usono/dolaro	13	32	79	47	28	158
TARIFO A/eŭro	6	16	40	24	14	80
TARIFO B/eŭro	6	16	40	24	14	80

ALIAJ LANDOJ Luksemburgio laŭ Belgio; Kipro kaj Malto laŭ Slovenio.

TARIFO A Honkongo, Korea Resp., Singapuro, Sud-Afriko, Tajvano.

TARIFO B Ĉiuj ceteraj landoj ne jam menciitaj.



supre La fresko "La kreo de Adamo" sur la plafono de la Siksta kapelo.

meze La fresko "La kreo de astroj kaj kreskaĵoj" sur la plafono de la Siksta kapelo.

maldekstre La reliefo "Madono ĉe ŝtuparo".